



Svisa Esperanto-Societo

# Informas

jaro 2004 numero 3-a: majo / aŭgusto  
kun informoj pri renkontoj ekde la 1-a de junio



**Gilbert Déhon, komunuma prezidanto en Les Brenets, inaŭguras la memor-ŝildon pri Edouard Ducommun kaj frazon post frazo Mireille Grosjean esperantigas lian paroladon. Malantaŭe aŭskultas Jeremy Wodarzik, lernanto en La Grande Ourse. (Fotis Stefano Keller.)**

# Rememorigilo

## SES informas

### Redakcio:

Claude GACOND, Poŝtfolio 5031,  
2305 La Chaux-de-Fonds 5

Retpoŝto: [claud.gacond@ne.ch](mailto:claud.gacond@ne.ch) &  
[gacond@bluewin.ch](mailto:gacond@bluewin.ch)

Tel.: ĉe CDELI: 032 967 68 55,  
hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29:  
indiki: por Claude GACOND

### Redaktaj kunlaborantoj:

Nancy FONTANNAZ, Andy KÜNZLI,  
Richard SCHNELLER.

## SES informas

### Redaktaj datlimoj por la venontaj numeroj

**2004-4:** septembro-oktobro: aŭguste 15.  
Mencio de informoj ekde la 15-a de septembro.

**2004-5:** novembro-decembro: oktobre 15.  
Mencio de informoj ekde la 15-a de novembro.

**2005-1:** januaro-februaro: decembre 15.  
Mencio de informoj ekde la 15-a de januaro.

**2005-2:** marto-aprilo: februare 15. Mencio  
de informoj ekde la 15-a de marto.

## SES-estraro

Bruno Graf, prezidanto, Jurastrasse 23,  
3063 Ittigen/Bern. Tel.: 031 921 44 59. Ret-  
poŝto: [bgraf.o@bluewin.ch](mailto:bgraf.o@bluewin.ch)

Dietrich Weidmann, vicprezidanto, PF 301,  
8034 Zürich. Tel.: 044 251 50 25. Retpoŝto:  
[info@esperanto.ch](mailto:info@esperanto.ch)

Mireille Grosjean, vic-pezidanto, Grand-Rue  
9, 2416 Les Brenets. Tel.: 032 932 18 88.  
Ret-poŝto: [mireille.grosjean@rpn.ch](mailto:mireille.grosjean@rpn.ch)

Nicole Margot, sekretario, Chemin des Lys  
4, 1010 Lausanne. Tel.: 021 653 14 67. Ret-  
poŝto: [n.margot@bluewin.ch](mailto:n.margot@bluewin.ch)

Hans-Werner Grossmann, kasisto,  
Esperanto-Servo, PF 262, 4132 MuttENZ 1.  
Tel.: 076 460 8992. Retpoŝto: [esperanto-servo@bluewin.ch](mailto:esperanto-servo@bluewin.ch)

Chiara Fabbri, peranto itallingva kaj junul-  
ara, Sägenstrasse 8, 7000 Chur. Retpoŝto:  
[chiara-fp@bluewin.ch](mailto:chiara-fp@bluewin.ch)

## Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo 2300 La Chaux-de-  
Fonds

## Kotizoj al SES

kun ricevado de *SES informas*.

fr. 10	infanoj	ĝis 18 jaroj
fr. 20	junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
fr. 35	plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
fr. 50	paroj	"
fr. 70	patronoj	"
fr 25	nura abono al	<i>SES informas</i>





# Svisa kalendaro

## Junie

- 1: Genève: La Stelo: Kunveno.  
2: Luzern: LES: kunveno.  
2: Wil: EKW: Kunveno.  
13: Zürich: ESZ: Libera kafumado.  
13: Lausanne: LES: Ekskurso al Zoo de Servion.  
24: Basel: ESB: kunveno minigolfa.

## Julie

- 5-10: Grindelwald: KCE: naturamika semajno.  
6: Lausanne: Esperanto en "Passeport Vacances".  
7: Luzern: LES: Kunveno.  
7: Wil: EKW: Minigolfa ludo.  
8: Lausanne: Esperanto en "Passeport Vacances".  
11: Zürich: ESZ: Libera kafumado.  
13-18: Chaux-de-Fonds: KCE: Internacia kursaro.  
17: Genève: La Stelo: Kunveno Insulo Rousseau.  
20-25: Chaux-de-Fonds: KCE: Internacia kursaro.  
24-31: Beijing (Ĉinio): 89-a Universala Kongreso.

## Aŭguste

- 2: Lausanne: Esperanto en "Passeport Vacances".  
2-6: Engadino: KCE: romanĉa semajno.  
4: Lausanne: Esperanto en "Passeport Vacances".  
7: Luzern: LES: Ekskurso.  
7-14: Chaux-de-Fonds: KCE: Kultura semajno.  
8: Zürich: ESZ: Libera kafumado.  
8: Wil: EKW: Ekskurso tuttaga Rorschach-Heiden.  
14: Genève: La Stelo: Kunveno Insulo Rousseau.

- 14-21: Chaux-de-Fonds: KCE: Seminario.  
15: Redakta datlimo de SES informas.  
29: Basel: ESB: Ekskurso al Bettingen.

## Septembre

- 1: Luzern: LES: Kunveno.  
1: Wil: EKW: Kunveno.  
6: Lausanne: LES: Kunveno.  
7: Genève: La Stelo: Kunveno.  
12: Zürich: ESZ: Libera kafumado.  
25-26: Chaux-de-Fonds: KCE: Semajnfino.

## Oktobre

- 4: Lausanne: LES: Kunveno.  
5: Genève: La Stelo: Kunveno.  
6: Luzern: LES: Kunveno.  
6: Wil: EKW: Kunveno.  
8-9: Wien: Internacia Esperanto-Simpozio.  
15: Redakta datlimo de SES informas.

## Novembre

- 1: Lausanne: LES: Kunveno.  
3: Wil: EKW: Kunveno.  
2: Genève: La Stelo: Kunveno.  
3: Luzern: LES: Kunveno.  
20: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.

## Decembre

- 1: Luzern: LES: Kunveno.  
1: Wil: EKW: Zamenhofa festo.  
7: Genève: La Stelo: Kunveno.  
12: Lausanne: LES: Zamenhofa festo.  
15: Redakta datlimo de SES informas.

## 2005

## Marte

- 1: Genève: La Stelo: Ĝenerala kunveno.

# Vivo de SES

## Protokolo de la Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo Les Brenets, 24-an de aprilo 2004

16 h 20: 29 voĉrajtaj membroj ĉe-  
estas la kunvenon.

### 1. Komunikoj de la prezidanto.

La prezidanto, Bruno Graf, esprimas  
sian plezuron sidi en tiel bela loko. Li  
prezentas la estraron:

Vicprezidanto kaj reprezentanto de  
Alemanio: Dietrich Weidmann.

Kasisto: Hans-Werner Grossmann.

Sekretario kaj reprezentanto de  
Romandio: Nicole Margot.

Li senkulpigas la reprezentanton de  
itallingva Svislando: Chiara Fabbri.

Mireille Grosjean estas kandidato al  
dua vicprezidanteco, tiel ekestos pli  
ekvilibra reprezentado de la diversaj  
kulturoj de Svislando en la estraro.

Bruno Graf rimarkigas, ke la tempo  
estas limigita al nur unu horo por kun-  
veno grava koncerne la funkciadon de  
nia societo. Li petas la indulgon de la  
ĉeestantoj, ĉar ni devos rapidi.

**Senkulpiĝoj:** Gesinjoroj Erna  
Döring, Alain Favre, Ernst Glättli,  
Margrit Guldin, Ueli Hänni, Claude  
Piron.

**Forpasintoj:** Ni observas unu-  
minutan silenton honore al la membroj,  
kiuj forpasis dum la jaro:

- Sinjoro Walter Giannini el Zolliker-  
berg (nekrologo aperis en *SES  
informas* 2003-3)

- Sinjorino Charlotte Ecklin el  
Lucerno, kiu heredigis al SES sumon  
de CHF 4000.-.

### 2. Elektoj de la voĉnombrantoj:

Nicole Bérout-Focke, Laurent  
Burgbacher.

### 3. Protokolo de la lastjara Ĝenerala Kunveno:

Unuanime akceptita.

**4. Jarraporto 2003, Jarkalkulo kaj  
bilanco kun raporto de la kas-  
kontrolantoj:**



**Jarraporto 2003**, aperinta en *SES informas* 2004-2. Dum la pasinta jaro ni komencis festi nian jubileon en Lausanne-Ouchy kun ŝipado al Rolle, la naskiĝurbo de SES. La prezidanto miris pri la altnombra partopreno, kiu laŭ li estis vere neatendita surprizo, pli ol 100 ĉeestintoj! La jubilea festado rekomencis en Vevey kun la prelegoj de Andy Künzli kaj Claude Gacond pri nia historio. Ekspozicio pri esperanto estis aranĝita en tiu urbo kun la kunlaboro de Charlotte Blanc Maillard. Tiu jubileo finiĝas hodiaŭ en Les Brenets per honorigo de nia pioniro Edouard Ducommun, kiu vivis en Les Brenets, kaj inaŭguro de memorŝildo je la enirejo de lia domo kun la partopreno de la lokaj aŭtoritatoj kaj loĝantoj. Ni gratulas la organizanton, Claude Gacond, kiu dum tiu asembleo informas la vilaĝanojn pri esperanto. Oni povas diri, ke en Svislando Claude Gacond estis la esperantisto de la jaro.

#### **Jarkalkulo, bilanco:**

Bruno Graf mencias la fonduson Agado 2003, el kiu CHF 10'000.- iris al la verkado de la Svisa Enciklopedio, 3000.- al la diversaj organizitaj eventoj. Restas CHF 3'674.80. Christiane Sixtus-Pot konfirmas tion en la revizio-raporto, kiu aperas samnumere.

La jarkalkulo kaj bilanco estas akceptitaj, kun 1 sindeteno, kaj la estraro malŝarĝita.

#### **5. Agado 2004 kaj buĝeto.**

Sumo de CHF 2'500.- estas buĝetita por la daŭriga verkado de la koresponda kurso germanlingva. Ni

serĉas bonvolulon por tiu tasko. Se neniu sviso proponos sin, ni devos peti, ĉu aŭstro, ĉu germano konsentos dediĉiĝi al tiu tasko.

Jam menciita heredaĵo venos kompensi nian planitan deficiton.

Richard Schneller petas informojn pri la sumo buĝetita por varbado. Bruno Graf respondas, ke temas pri:

- Senpaga sendo de SES-informas al interesatoj.

- Subvencio al varbaj agadoj.

- Dosieroj regule sendataj fare de Mireille Grosjean al la gazetaro.

Estas malgranda sumo sed ni iris ĝis la ekstremo de niaj eblecoj. Dietrich Weidmann rimarkigas, ke la estraro jam altigis tiun sumon de CHF 4000.- al CHF 5000.-.

Claude Gacond estas petita doni kelkajn informojn pri la Svisa Enciklopedio: Oni alvenas je la etapo de finredaktado, finordigo kaj kolekto de fotoj. Andy Künzli regule sendas tekstojn, ekzamenatajn de Claude Gacond, Detlev Blanke kaj Reinhard Hauptenthal. Oni senĉese retrovas novajn faktojn, sed oni devas nun decidi pri halto. Aldoniĝos artikoloj en la tri naciaj lingvoj kaj indekso. Oni elektis la neŭŝatelan presejon Messeiller, konata pro fakaj presadoj. Publikigo verŝajne okazos en aŭtuno 2005 kaj kongruos kun la inaŭguro de la nova salono de CDELI. Oni rezignis pri la ideo presigi ĝin en Orienteŭropo, ĉar la poŝtaj kaj doganaj kostoj samniveleligus la prezon kun tiu de Svislando.

Je tiu momento la prezidanto donacas honorvinon al Claude Gacond pro lia grandega laboro.

Claude Gacond rimarkas, ke nun la reala vivo de esperanto eskapas al la asocioj kaj okazas ĉefe sur interreto. Li tre forte alvokas al aparta flegado de la infanoj kaj junuloj, kiu devas esti la ĉefa tasko de nia societo, tasko por la estonto.

Bruno Graf informas pri la decido de la estraro aliĝi al Eŭropa Esperanto Unio. Nicole Margot estas delegita kiel observanto, ŝi vojaĝos al la venonta kongreso de EEU en Bilbao. La estraro ankaŭ decidis subteni la Bruselan Komunikad-Centron per 400 eŭroj.

La buĝeto estas unuanime akceptita.

#### **6. Elektaj al la estraro.**

Hans-Werner Grossmann estas nia nova kasisto post la demisio de Elisabeth Lauper.

Mireille Grosjean estas proponita kiel dua vicprezidanto.

Ambaŭ estas unuanime elektitaj kaj aplaŭdataj.

#### **7. Diversaĵoj.**

Nicole Margot donas novaĵojn pri la strasburga manifestacio, Eŭropa Bunto. Ŝi insistas pri la graveco de la afero, kuraĝigas la homojn iri manifestacii, eĉ decidi pri tio lastmomente, se necesas.

Dieter Rooke salutas je la nomo de Kultura Centro Esperantista kaj invitas la ĉeestantojn viziti la centron.

Mireille Grosjean demandas, kiom da personoj iros al la venonta UK en Pekino. Du: Dieter Rooke kaj ŝi mem. Mireille reprezentas SES-on en la

komitato de UEA ekde la jaro 1998 kaj plezure faras tion.

Dietrich Weidmann salutas nome de Esperanto-Societo Zuriko kaj proponas gastigi la venontjaran Ĝeneralan Kunvenon de SES.

Bruno Graf konkludas, komparante esperanton ne kun mar-ondoj, sed kun Doubs-ondoj. La fluo senteble altiĝis dum la jubilea jaro.

La kunveno estas fermita je la 17 h 25.

Nicole Margot

-oOo-

### **Raporto de la kaskontrolantoj por la jaro 2003**

Ni, subskribintoj, Dieter Rooke kaj Christiane Sixtus, kunvenis kun la kasisto Hans-Werner Grossmann, la 3-an de aprilo 2004 en Olten por kontroli la librotenadon.

La saldoj de la jaro 2002 estas ĝuste transskribitaj kaj la kontrolitaj ciferoj kongruas kun la privilejoj.

La malaltiĝo de pli ol 21'000 CHF en la WIR-banko estas pravigita per elspezoj por la 100-jara jubileo de SES (enciklopedio 10'000 kaj antaŭpago de 3'000 al Claude Gacond, kiu espereble povos baldaŭ raporti, kiom el tiu ĉi mono restas), la nuligo de la konto CDELI (6'256.65) kaj diversaj malaltaj elspezoj (ĉefe por SES).



En la buĝeto 2003 troviĝas investo de CHF 5'000 por redaktado de perkoresponda kurso germanlingva. Fakte elspeziĝis 2'500 por la enkomputiligo de la malnova kurso. Restas do multe da farena laboro por aktualigi ĝin.

Ni kore dankas nian kasiston Hans-Werner Grossmann por la tre bone farita librotenado. Ni proponas al la Ĝenerala Jarkunveno aprobi ĝin (kun

malprofito de CHF 2'519.25), la bilancon 2003 kaj malŝarĝi la kasiston kaj la estraron.

Olten, la 3an de aprilo 2004.

Kontrolantoj:  
Christiane Sixtus  
Dieter Rooke



**Bruno Graf salute malfermas la jubilean renkonton en Les Brenets.**

(Fotis Stefano Keller)

# Donacoj

Donacoj en frankoj ricevitaj ĝis la 10-a de aprilo

**al SES:** Cesare Amari, Chiasso: 15; Françoise Badoux, Lausanne: 35; David Bühlmann, Prilly: 30; Tazio Carlevaro, Bellinzona: 50; Pierre Dorthe, Lausanne: 30; Andrée kaj Claude Gacond, La Chaux-de-Fonds: 15; Renate Heer, Bern: 25; Gudrun Imfeld-Stamm, Lungern: 35; Marguerite Jayet, Morges: 35; Alois Koller, Zürich: 65; Jean-Jacques Lavanchy, La Tour-de-Peilz: 25; Piroska Mórocz, Zürich: 5; Eduard Muster, Lausanne: 35; Luciano Ortelli, Luzern: 50; Dieter Rooke, Oensingen: 21.40; Lydia Roth-Fisler, Zürich: 35; Christiane Sixtus Pot, Perly: 73; Suzanne Wanner, Plan-les-Ouates: 25.  
**Sume: 604.40.**

**Agado 2003:** Anonimulo: 50; Louise Bachmann, Emmen: 25; Komunumo Les Brenets: 200. **Sume: 275.**

**Patronoj 2004:** Claude kaj Nicole Piron, Gland.

Nome de SES la kasisto Hans-Werner Grossmann dankas la registritajn donacintojn pro ties malavareco kaj antaŭdankas pro la atento, kiun ĉiu alportos al la pagilo aldonita al la nuna bulteno.

-oOo-

## SES subtenas eŭropan agadon

Ni estas meze en Eŭropo kaj ligitaj kun najbaroj. Tio aparte veras por Esperantio. Se esperanto floras ie en Eŭropo, kiel ekzemple en Litovio, tio ankaŭ estas referenco por nia lando. Kunlaboro kaj reciproka helpo kreas sinergion en la disvastigo de esperanto. Tial la estraro de SES decidis subteni difinitan eŭropan agadon.

Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) iniciatis Bruselan Komunikad-Centron (BKC), kiu atentigas ĵurnalistojn kaj politikistojn pri lingvaj malegaleco kaj demokratio. Tio estas politike la plej grava argumento por pledi favore al esperanto. En Eŭropa Unio (EU) estas uzata pli kaj pli nur la angla kaj iom la franca, dum la ceteraj lingvoj de la membroŝtatoj estas neglektataj. BKC efike kritikis tiun praktikon de la EU-administrejo kaj ankaŭ la emon dungi prefere oficistojn, kiuj denaske parolas la anglan.

Lige kun la UK en Gotenburgo BKC redaktis modelajn leterojn cele al informado de la gazetaro. Necesis nur adapti la tekstojn kaj sendi ilin al redakcioj. Mi faris tion kun sukceso. *Berner Zeitung* petis pri intervjuo kaj aperigis longan artikolon kun foto. Tiel okazis en diversaj landoj. Ankaŭ Mireille



Grosjean uzas tiun informaterialon por la dosieroj, kiujn ŝi sendas al romandaj ĵurnalistoj.

Vide al tiu situacio la estraro konkludis, ke ni profitas de BKC kaj ankaŭ pagu nian obolon. Kiam venis la alvoko de BKC vivteni ĝin ankaŭ dum 2004, ĉar mankas mono, ni decidis subteni BKC-on per 400 eŭroj. Tio estas certe pravigita investo.

Sekve la kasisto de EEU, J. H. Derks, invitis nin fariĝi membro-observanto de EEU. Landaj asocioj

de membroŝtatoj de EU rajtas aliĝi kiel membroj, aliaj kiel membro-observantoj. Svislando membras en Eŭropa Konsilio, sed ne en Eŭropa Unio. La estraro faris ankaŭ la duan paŝon kaj decidis aliĝi al EEU por montri solidarecon kun la esperanta eŭropa agado. Nicole Margot akceptis reprezenti SES-on kiel observanto en la kongreso de EEU, kiu okazos dum aŭgusto en Bilbao.

Bruno Graf


## **Sukcesa konkludo al la centjara jubileo de SES en la vilaĝo Les Brenets**

Konkludiĝis en Les Brenets la festado de la centjariĝo de SES per tre signifa renkonto intergeneracia kaj interpublika. Sin esprimis esperantlingve ne nur plenkreskuloj per la voĉoj de Bruno Graf, Mireille Grosjean kaj Claude Gacond, sed ankaŭ per signifaj kontribuoj de la junulo Luc Allemand kaj de 11 gelernantoj de La Grande Ourse.

Matene la publiko estis ekvilibre du-lingva. La kafuma akcepto kunigis sesdek da esperantlingvanoj kaj saman nombron da neesperantanoj: vilaĝanoj kaj gepatroj de gelernantoj de La

Grande Ourse. Tial la salutvortojn de la prezidantoj de SES kaj de la komunumo, Bruno Graf kaj Gilbert Déhon, francigis aŭ esperantigis frazon post frazo Mireille Grosjean, dum multaj ĉeestantoj fiere admiris la interpretistan talenton de sia samvilaĝanino.

Kaj la interpretisto de la vilaĝa historiisto Pierre Deléglise estis la juna Luc Allemand. Ilian prezenton de la eksterordinara personeco de la instruisto Edouard Ducommun ĉiu aŭskultis kun granda intereso.



### **Pierre Deléglise klariganta sian ekspozicion pri Edouard Ducommun.**

(Fotis Stefano Keller)

Ekzakte antaŭ cent jaroj, en aprilo 1904, tiu avangarda pedagogo konkludis kun sia klaso tre sukcesan instruadon de esperanto per kolekto de poŝtkartoj el la tuta mondo. Tial intermeze al tiu prelego la infanoj de la lernejo La Grande Ourse humure prezentis poŝtkartojn el la tiama kolekto de Edouard Ducommun kaj de lia filo Félix, kaj ili kompletigis tiun ĉi

retroprojekciadon de bildoj centjaraĝaj per prezento de propraj desegnaĵoj montrantaj, kiel povos esti la vivo en la jaro 2104. Tiam pluraj gepatroj esprimis per sia rigardo fieron pri la esperantlingva talento de siaj idoj.

Posttagmeze, dum la SES-anoj kun-sidis en aparta salono, multaj vilaĝanoj revenis por viziti la ekspozicion pri Edouard Ducommun kaj informiĝi pri



esperanto. Ili diris sian surprizon pri la belsoneco de tiu ĉi lingvo internacia.

Enkonduke al sia kunsido la SES-anoj ricevis viziton de Luc Allemand, kiu ŝvarceske rememorigis kelkajn sekretojn de la esperanta Fundamento. Ĉiuj admiris lian aktoran talenton.

Inter ambaŭ kunsidoj matena kaj posttagmeza en la gimastikejaj salonoj, ĉiuj ĝuis pri la ŝipa ekskurso sur la rivero Doubs, pri la iom tro rapida aperitiva promeno al la akvofalo, pri bona komuna tagmanĝo kaj ankaŭ pri la reveno vilaĝen ĉu promene, ĉu ŝipe.

Retroviĝis ĉiuj precize je la 15 h 30 ĉe la domo Grand-Rue 14 aparteninta al Edouard Ducommun. Antaŭ ol adiaŭi la ĉeestantojn, por kuri al la stacidomo, la gelernantoj de La Grande Ourse helpis al Romain Bélisle elglui la paperon, kiu kaŝis la memorŝildon pri Edouard Ducommun, kiun digne inaŭguris Gilbert Déhon, la prezidanto de la komunumo, per la parolado, kiun ni ĉi sekve publikigas en esperanta versio.



**Kopio de Foto Galley illustre al tre bona artikolo subskribita PAF aperinta la lundon 26-an de aprilo en la tag-gazetoj *L'Impartial* de La Chaux-de-Fonds kaj *L'Express* de Neuchâtel.**

De la dekstro oni vidas Wendy De Marinis, Aurélia Wille, Bérengère Jeckelmann, Patrick Imer rigardantaj la ŝildon ĵus malkovritan de Romain Bélisle tenata de Mario Gandolfo kaj de lia avino Mireille Grosjean.

Indas mencii, ke la nunaj posedantoj, gesinjoroj François Eisenring, ne nur mem fiksas la ŝildon dekstre de sia domeniĝejo, sed ankaŭ kontribuis al ties pago per donaco de Fr. 200.-, kaj ke per sama mon-sumo la komunumo Les Brenets subvenciis la manifestacion.

Koncerne al la valora ekspozicio pri Edouard Ducommun, ni povas anonci, ke Pierre Deléglise transformos ĝin al dosiero elpruntebla ĉe CDELI. Tiel lia gravega laboro de historiisto restos daŭre konsultebla.

Kaj nun el ofte foraj lokoj esperantistoj certe venos al Les Brenets por foti en tiu vilaĝo la ŝildon rememoranta pri la esperanto-pioniro Edouard Ducommun. Kaj vizitante la belan regionon ili marŝos al la malkovro de la esperanto-stelo, kiun tiu avangarda pedagogo pentris sur la vojo al Saut-du-Doubs en la komenco de la dudeka jarcento kaj kiun la esperantlingvaj vilaĝanoj restaŭras kun fideleco, kiam la verda farbo eksvenas. Tion faris siatepe John Thum kaj ĵus antaŭ la renkonto renovigis Mireille Grosjean.

## Inaŭgura parolado de la komunuma prezidanto Gilbert Déhon



(Fotis Stefano Keller)

*"Sinjoro prezidanto de Svisa Esperanto-Societo,  
Gesinjoroj esperantlingvaj, karaj amikoj el Les Brenets kaj aliloke,*

*Eksterordinara evento nin kunigas hodiaŭ. Rememore al la grandaj homoj agintaj en nia vilaĝo, ĉu industri- aŭ kultur-cele, ni fiere*



omaĝas al *Edouard Ducommun* (1865-1951).

Estas en 1904, do ekzakte antaŭ 100 jaroj, kiam *Edouard Ducommun*, naskita en 1865, efektivigis kun sukceso en la lernejo *Les Monts sur Le Locle*, dum la lern-periodo de aŭgusto 1903 al aprilo 1904, la unuan eksperimenton de esperanto-kurso en publika elementa lernejo.

Lin tiucele kuraĝigis la tiama direktoro de la publika instruado en *Le Locle*, *Alfred-Paul Dubois*, unu el la unuaj esperanto-praktikantoj en la *Neŭŝatela Montaro*. Kaj en *Le Locle* mem *Edouard Ducommun* ankaŭ instruadis esperanton al la publiko kun la helpo de sia kolego *Paul Humberŝet*.

Tiu avangarda pedagogo favoris instalon de duŝejoj por ĉiuj gelernantoj kaj organizon de ferijaj restadoj. Kaj talente li agis kiel fotisto, muzikisto kaj inventanto.

Unu el liaj pranevinoj, kiu loĝas en *Alta Savojo*, malkovris en subtegmentejo skatolon kun 17 lernejoj kajeroj entenantaj gravajn informojn pri historiaĵoj kaj pri tiamaj aktualaĵoj rilate al *Les Brenets*, *Le Locle* kaj la ekuzo de esperanto. Tiun trovaĵon ŝi transdonis al nia vilaĝa historiisto *Pierre Deléglise*.

Tiuj dokumentoj konigas interalie la vortkonstruon en esperanto kaj donas ideon pri tiu internacia lingvo. Ili ankaŭ atestas, ke *Edouard Ducommun* estis reformema rilate al la franc-lingva ortografio, interesigis pri stenografio kaj faris eksperimentojn kemiajn kaj fizikajn.

*Praktikante la foto-arton*, kiel mi ĵus menciis, nia avangardulo eldonadis poŝtkartojn, kiujn liaj gelernantoj dissendis tutmonden. Libreto, publikigita okaze de la centjarigo de la lerneja domo en *Les Monts du Locle*, liveras impresigan omaĝon honore al *Edouard Ducommun*, kiu instruadis dum 20 jaroj en tiu lernejo.

Muzika arango de *Edouard Ducommun*, kiun inspiris poemo de *Lejzer Zamenhof*, estis kantata en la *Granda Teatro de Genève* en 1906 okaze de la dua *Universala Kongreso de Esperanto*.

*Edouard Ducommun* estis spirito ideoplena kaj inventema, kaj sian kapablaron li ne limigis al mura pedagogia aktiveco. Li ekzemple konstruis presilon, kiu ebligis eldoni kunvokilojn kaj tradukaĵojn.

Koncerne al lia fotista talento indas menci, ke en liaj skribaĵoj inventariigas pli ol 2'400 plak-kliŝoj mem realigitaj en la propra laborejo. Kelkajn el ili zorgeme konservas nun la *Urba Biblioteko en Le Locle*.

Konata pro siaj artikoloj en la tiamaj lokaj gazetoj, li ankaŭ estis ŝatata preleganto kaj historiisto pri la antaŭa vivo en la urbo *Le Locle*.

Pro gorgŝuferado *Edouard Ducommun* emeritiĝis en 1924 post 40-jara instru-kariero. La leĝo devigis lin loĝadi en la komunumo *Le Locle*, kie li laboris, sed ekde sia pensionigo li fine rajtis establiĝi en *Les Brenets* en sia domo ĉe la strato *Grand-Rue* numero 14-a, kiu ĝis tiam rolis kiel dua aŭ feria loĝejo.

*Restinte aktiva li tiam kreis orkestron kaj interalie verkis la jubilean broŝuron festantan en 1938 la centjarigon de la fanfaro de Les Brenets.*

*Fotemulo, li ŝatis promeni en la gorĝoj de la rivero Doubs kun sia amiko Edouard Seitz kaj sidiĝi ĉe rokaro survoje al Saut-du-Doubs, kie li estis pentrinta esperantan stelon komence de la jarcento.*

*Verkante sian ĵurnalon tagon post tago li notadis pri-veterajn informojn kaj priskribis siajn okupojn. Pli ol 8'000 el liaj tagoj estas tiel priskribitaj kun precizo. Tio konsistigas ne-estimeblan trezoron legeblan en la 17 retrovitaj kajeroj, kiuj raportas pri multaj regionaj eventoj, pri historiaj esploroj efektivigitaj en la Neŭŝatela*

*Kastelo kaj en bibliotekoj. Tiuj raportoj ebligis al nia vilaĝa historiisto pliprecizigi historiaĵojn de nia vilaĝo.*

*Do nome de Svisa Esperanto-Societo mi havas la elstaran honoron inaŭgure malkovrigi la memor-ŝildon, kiu omaĝas al tiu pioniro de esperanto kaj al lia fruktodona instruado.*

*Edouard Ducommun meritas respektemon kaj admiron pro sia neordinara vivoverko 86-jara.*

*Tiu rimarkinda civitano vere meritis, ke ni dediĉu al li unu dankeman tagon pro lia viv-ekzemplo."*

Gilbert Déhon, komunuma prezidento.



**En la restoracio: Konversacias Luc Allemand, Mireille Grosjean kun sia nepo Romain Bélisle kaj Laurent Burgbacher. (Fotis Stefano Keller)**





**Dum la matena retroprojekciado Aurélia Wille mikrofone klarigas, ke:** *"En 1904 la fotoj estis nur nigraj-blankaj kaj grizaj. Tiun ĉi foton ni ankoraŭ vidas tre bone, sed kelkaj aliaj post cent jaroj jam ne plu estas klaraj."* (Fotis Stefano Keller.)

### **Citaĵo el la gazeta raporto**

La matenaj salutvortoj de Gilbert Déhon enkonduke al la festa renkonto ankaŭ indus je publikigo en esperanta versio. Sed pro paĝa manko ni kontentiĝu je nura mencio el ero de la gazeta raporto aperinta en *L'Impartial* kaj *L'Express* koncerne al liaj diroj pri esperanto:

"Enkonduke Gilbert Déhon, la komunuma prezidanto, energie reagis kontraŭ la fakto, ke tro ofte subtaksiĝas la graveco de esperanto imagita de Lejzer Zamenhof kiel internacia helpa lingvo: *"Kiu inter ni ne cedis al emo*

*pensi pri la semutileco de tiu tiel aparta lingvo? Tial la publikaj instancoj plej ofte malinteresiĝas pri ĝi, kiam ili ne plene ignoras ĝin. Anstataŭ plende vidi nian francan lingvon svenanta profite al esprimoj pli kaj pli anglecaj, ĉu ne estus pli efike akcepti esperanton kiel universalan komunikan rimedon?"*



**Angéline Wille atentigas, ke:** *"La kostumoj kaj la kutimoj ne estas la samaj kiel en 1904. Nun la japanoj metas tiujn kostumojn nur por festoj aŭ specialaj okazoj."* (Fotis Stefano Keller)

Dum ĉiu klasano vice prezentis sian centjaraĝan poŝtkarton kaj sian futurisman desegnaĵon, la aliaj gelernantoj side aŭskultis kun la instruistino. Jen ili:





**Maldekstre vicas Thierry Imer, David Favre, la instruistino Anke Brouwer, Mario Gandolfo iom kaŝita, Jeremy Wodarzik, Angéline Wille, la pedagogia respondeculino Véra Zaslavsky...**

**Dekstre: Bérengère Jeckelmann, Jeffrey Wodarzik, Wendy De Marinis, Lucas Haussener...** (Fotis Monika Molnar)

Kvar vicoj da tabloj ebligis agrablan sensoifiĝon al la 120 geaŭskultantoj.

## **Junaj ŝipestroj!**

Dum la ŝipado en la antaŭa budo la plenkreskuloj, admirantaj la pejzaĝon kaj aŭskultantaj la klarigojn de Mireille Grosjean kaj de ŝia nepo Romain Bélisle, ne imagis, ke en la malantaŭa budo la boaton vice stiris la infanoj de La Grande Ourse. Rigardu, kiel atente ili plenumis sian gvidan taskon.


Almenaŭ estas fakto, ke ĉiuj pasaĝeroj atingis senakcidente la celitan elirejon ĉe la restoracio de Saut-du-Doubs.

Povas esti, ke en tiu vojaĝo ŝipestra kariero debutis ĉe unu el la junaj stiristoj.





**La ŝipstiranto Mario Gandolfo**



**David Favre kaj Patrick Imer  
atentas ne perdi la bonan direkton.**



**David Favre, Patrick Imer kaj Mario Gandolfo ne nur rigardas la pejzaĝon,  
ankaŭ ili observas, ĉu la stiristoj kontentige plenumas sian funkcion!**

(Fotoj de Monika Molnar)



# Esperanto en la Neŭŝatela Kantono

Andy Künzli

## Le Locle kaj Les Brenets

Kun Ĝenevo kaj Vaŭdo, Neŭŝatelo estas svisa kantono, kies grundo pruviĝis plej fekunda por la esperanto-ideo. Laŭ la *Enciklopedio de Esperanto* (1933), kiel "unua provo ekplanti esperanton en la ŝtonan teron de Svislando" estas konsiderata la priesperanta parolado en 1898 de **Alfred-Paul Dubois** (1853-1918), direktoro de la publikaj elementa kaj komerca lernejoj en Le Locle.

Poste li realigis, kun aliaj esperanto-pioniroj de la Neŭŝatela Ĵuraso kiel **Edouard Ducommun**, **Henri Favre**, **Amélie Honer** kaj **Maurice Montandon** (ĉiuj instruistoj) esperanto-kurson por la instruistoj de la urbo Le Locle kaj starigis lokan Esperanto-Grupon.

## Edouard Ducommun

Edouard Ducommun (1865-1951) estis konata pedagogo, socia aktivulo en Les Brenets kaj en Le Locle. En 1901 ĉi tiu esperanto-pioniro ekde 1899 malfermis en Les Monts sur Le Locle la unuan esperanto-kurson por infanoj en publika lernejo, por starigi en 1903 interlernejan korespondadon per

esperanto inter diversnaciaj ge-knaboj. Li estas tiurilate antaŭulo de la interlerneja korespondado *Grajnoj en Vento* iniciatita en la 50-aj jaroj de **Marcel Erbetta**, instruisto en Biel-Bienne.

En 1904 Edouard Ducommun fondis kaj dum 20 jaroj prezidis la lokan Esperanto-Grupon en Les Brenets kaj samtempe li rolis kiel vicprezidanto de la Esperanto-Grupo en Le Locle. En 1949 SES proklamis lin honora membro. Ankaŭ lia edzino, liaj bofratinoj (Droz) kaj iom poste ankaŭ liaj tri infanoj aliĝis al la esperanto-movado. Laŭ rakonto, Edouard Ducommun pentris sur roko la verdan stelon, kiu estas ankoraŭ videbla laŭ la vojo de Les Brenets al la akvofalo Saut-du-Doubs.

## Aktiva Esperanto-Grupo

En la urbo Le Locle, kie la fondo de la loka Esperanto-Grupo okazis en 1904, aktivis, krom Edouard Ducommun, Alfred-Paul Dubois kaj Henri Favre, ankaŭ **Paul Humberst** (1883-1968), instruisto kaj ano de la ekzamena komisiono de SES, frua esperantisto de la periodo 1903-1907 (kun supera diplomo), SAT-delegito ek-



de 1928, **Marie Marchand**, instruistino, **Th. Roniger**, **P. Girard**, **Mathilde Meylan-Jeanmairet** (+1938) kaj **Louise Perrenoud**, la patrino de la posta esperantisto kaj KCE-funkciulo **René-William Perrenoud** (1904-1996).

En 1906 Henri Favre havis 40 kaj Edouard Ducommun 65 esperanto-kursanojn.

### En vilaĝoj kaj Neuchâtel

La unua nomaro de SES-anoj, publikigita en *Svisa Espero* en 1903, listigas krom unuopuloj en la urbetoj Colombier, Couvet, Môtiers, Saint-Aubin, Vaumarcus kaj Les Ponts-de-Martel, ankoraŭ aliajn adeptojn: **F. Lecoultre** kaj **G. Nicolas**, instruisto kaj bankisto en Neuchâtel, kaj **Hermann Stroele** (1880-1921), astronomo ĉe la neŭŝatela observatorio kaj universitata docento, kies frato **Georges Stroele** (1879-1943) apartenis al la unua generacio de svisaj esperantistoj, kiuj persone konis L. L. Zamenhof.

### La fratoj Stroele

Georges Stroele estris la lokan Esperanto-Grupon en Couvet, kaj kun sia frato li iniciatis la kreon de la neŭŝatela Esperanto-Grupo. Kaj li gvidis esperanto-kursojn, membris en la Centra Komitato de

SES kaj estis ankaŭ prezidanto de la Ekzamena Komitato de SES.

Ambaŭ fratoj Stroele apartenis al la Lingva Komitato, tradukis diversajn verkojn el la franca literaturo (Arnoux, Musset), kiujn publikigis *La Revuo* kaj *Esperanto*, kies recenzanto Georges Stroele estis sub la pseŭdonimo **Goso**, tiel ke en *Rimportretoj* Kálmán Kalocsay verkis jenan poemon pri li, kiu bone reliefigas lian iom tro afablan kritikan sintenon:

*Stroele*, el recenzista gildo  
Karesas ame ĉiun belon,  
Kvankam atentis la nivelon,  
Recenzas li kun kora mildo.

Jen certe lia blazonŝildo:  
Plumo trempita en mielon.  
*Stroele*, el recenzista gildo  
Karesas ame ĉiun belon.

"Poeto estas orfa birdo,  
Soifas varmon kaj sunhelon"  
Li pensas – "for do la kruelon."  
Ĉu mi eraris pri la bildo:

*Stroele*, el recenzista gildo.

Georges Stroele kunlaboris ankaŭ kun la redakcio de *Enciklopedio de Esperanto* (1933), en kiu li estas biografiita.

## Tre aktiva Esperanto-Grupo

Post diversaj prelegoj kaj la apero de gazetartikoloj, ekzemple en la organo de la komerca unuigo *Unioniste*, kaj post kelkaj kursoj, kiuj kunigis pli ol 250 lernantojn kaj pere de ekspozicio pri esperanto, kiun vizitis ĉirkaŭ mil personoj (*Svisa Espero* 10-12/1905), estis oficiale fondita, en la urbestra domo de Neuchâtel, fine de 1905 aŭ komence de 1906, la neŭŝatela Esperanto-Grupo, en ĉeesto de sepdeko da personoj. Kiel prezidanto estis elektita **Jean Wenger** (1881-1960). La instruisto kaj posta urbestro fervore disvastigis esperanton precipe en la jaroj antaŭ la unua mondmilito. Dum longa tempo Jean Wenger, kiu 1919-1921 estis ankaŭ prezidanto de SES, apartenis al la Lingva Komitato kaj al la Akademio de Esperanto. La nekrologo en *Svisa Espero* 3/1960 laŭdas lin, ĉar li parolis esperanton flue kaj elokvente.

Kiel honoraj membroj de la neŭŝatela Esperanto-Grupo estis elektitaj Alfred-Paul Dubois kaj **Jean Borel** (1868-1946), alia konata neŭŝatela esperanto-pioniro de la komenco de la jarcento. Li apartenis al la kunfondintoj de SES kaj estis ĝia unua vicprezidanto (1902/1903). En 1903 li forlasis Svislandon kun sia pli juna frato

**Jules Borel** (1873-1947) por fondi la berlinan paperfabrikon Möller & Borel GmbH, kiu funkciis samtempe kiel esperanto-eldonejo kaj presejo por la bezonata lernmaterialo por la germanlingvaj esperanto-studentoj. Ambaŭ fratoj revenis ruinigitaj en Svislandon post la elbrulo de sia entrepreno dum la dua mondmilito.

Inter aliaj neŭŝatelaj agadoj elstaris ankaŭ prelego de la svisa kaj franca esperantisto **Théophile Cart** (1855-1931) en 1906 antaŭ 800 personoj (la *Journal de Neuchâtel* detale raportis), nova esperanto-ekspozicio en la lernejo Collège de la Promenade kaj esperanto-kurso kun 120 partoprenantoj.

En tiu periodo oni renkontas ankaŭ jam la nomon de **Pierre Bovet** (1878-1965), kiu de 1903 ĝis 1912 laboris kiel docento pri filozofio en Neuchâtel. Pierre Bovet poste ludis gravan rolon en rilato kun la propagando de esperanto kadre de Ligo de Nacioj.

En 1908 la neŭŝatela Esperanto-Grupo organizis novan propagandan manifestacion sub la agad-nomo vesperfestoj, kiun partoprenis kvincento da homoj. „*La sukceso estis plena kaj superis ĉion esperitan*“, raportas *Svisa Espero*. La membronombro de la Esperanto-Grupo kreskis al 123.



Nature ne mankis ankaŭ negativaj spertoj. **Max Niedermann**, profesoro pri lingvoscienco ĉe la Neŭŝatela Universitato (tiam nomata Akademio), publike prelegis pri la problemo de la internacia help-lingvo. Antaŭ klera aŭdantaro li deklaris, ke artefarita lingvo ne estas vivopova kaj kritikis la esperantistojn, kiuj laŭ li faras vanan laboron. Hermann Stroele, kiu ĉeestis tiun prelegon, firme rebatis la kritikon de la skeptika profesoro. La gazetraportoj subtenis la vidpunkton de Stroele kaj la parolado de Niedermann finfine montriĝis kontraŭproduktiva.

Baldaŭ aperis en Neuchâtel ankaŭ **Edmond Privat** (1889-1962), kiu estis konsiderata kiel unu el la plej kompetentaj kaj elokventaj reprezentantoj de la esperanto-movado. En septembro 1908 la ĝenevano prelegis antaŭ 200 personoj pri la dezirinda enkonduko de nedeviga instruado de esperanto en la duagradaj kaj komercaj lernejoj de la neŭŝatela kantono. Dum la 20-aj jaroj tiu instrua eksperimento dank' al li sukcesis en Ĝenevo. Poste, 1945-1959, Privat trovis laborlokon kiel ordinara profesoro pri la anglaj lingvo kaj literaturo en la Neŭŝatela Universitato.

## Societemo

En tiu tempo la homoj estis societemaj kaj vigle kuniĝis en grupoj. Tiel aperis diversaj lokaj grupoj kiel jam menciite en Couvet (prezidanto **H. Biolley**, kun 43 membroj), Le Locle, Les Brenets, sed ankaŭ en La Chaux-de-Fonds kaj Dombresson, inkluzive de la tiam modaj esperanto-konsulejoj. Laŭ la gazeto *Vespera Horo* 6/1910 ankaŭ la esperantistoj de Chézard, Cernier kaj Fontainemelon starigis lokan Esperanto-Grupon kun 12 membroj, kiujn prezidis **Edgar Thiébaud**. **Edouard Matthey** instruis esperanton en Travers kaj rezultis en 1907 la fondo de loka Esperanto-Grupo kun instruisto **Charles Parel** kiel prezidanto. *Svisa Espero* 1/1907 raportas, ke alia Esperanto-Grupo fondiĝis inter lernantoj de la Komerca Lernejo en Neuchâtel.

## Reformismo

Ĉirkaŭ la jaroj 1912-1914, **Emma Chenevard** (1884-1939), kiu estis kasistino kaj 1917-1918 provizora prezidantino de SES, en 1919 estas listigita de la *Jarlibro* de UEA kiel ĝia delegitino en Neuchâtel. Poste ŝi aliĝis al la reformprojektoj de **René de Saussure**, transprenante la taskon de sekretariino de la Akademio

Esperantida (ĉirkaŭ 1924) kaj pli malfrue de la Nov-Esperanta Akademio (1932). Ŝi verkis lernolibron de la lingvo Esperantido.

### Ĉefgrupo de SES

Alia aktiva neŭŝatelanino, kiu mortis en 1926, nomiĝis **Emilie Straub**; ŝi oficis kiel sekretario de la neŭŝatela Esperanto-Grupo, estis UEA-ano, SES-komitatano kaj kursgvidanto (kun supera diplomo de SES) ĉirkaŭ la jaro 1908. En 1927 forpasis **Fritz Hodel** (1875-1927), plia sindonema ano de UEA en Neuchâtel. Al la neŭŝatela Esperanto-Grupo multajn jarojn apartenis ankaŭ **Berthe Breguet**, kiu estas listigita inter la partoprenantoj de la 2-a Universala Kongreso en Ĝenevo. Ŝi mortis en 1954 en La Tour-de-Peilz.

En la 20-aj jaroj, la neŭŝatela Esperanto-Grupo funkciis kiel ĉefgrupo de SES, kio signifis, ke ĝi estis unu el la plej aktivaj lokaj esperanto-societoj.

En la 30-aj jaroj ĝi estis reorganizita de René-William Perrenoud (1904-1996). Li ne estas parenco de **William Perrenoud** (1898-1984), alia tre aktiva neŭŝatela esperantisto, inventinto de la geonismo kaj de la Ora metodo, kies koncernaj broŝuroj estis eldonitaj en Neuchâtel.

Kiel esperantisto de tiu tempo estas nominda ankaŭ **Jean-**

**Rodolphe Laederach** (\*1910), kiu pasigis sian profesion vivon kiel protestanta pastoro en Serrières kaj dum 37 jaroj redaktis la komunuman monatan bultenon *Le journal de Serrières*. Li malkovris esperanton en 1924, estis ankaŭ membro de SES kaj KELI, kaj loĝas en Peseux.

### Post la dua mondmilito

Postmilito, dum multaj jaroj, la neŭŝatela Esperanto-Grupo estis gvidata de d-ro **Alfred Wenger** (1917-2003), kiu translokiĝis al Chez-le-Bart post sia emeritiĝo. Profesie, Alfred Wenger estis kuracisto, doktoriĝinta en la Ĝeneva Universitato en 1948 kaj li laboris kiel pediatro en Neuchâtel ĝis 1984. Li lernis esperanton en 1951, estis UEA-delegito, kunlaboranto de SES kaj apoganto de KCE.

Alia aktiva membrino de la neŭŝatela Esperanto-Grupo estis **Gabrielle Gacond-Lüscher** (1908-1999), la patrino de **Claude Gacond**, kiu ekhavis simpation al la zamenhofa lingvo pere de la gazetartikoloj de Edmond Privat en *L'Essor*. Ŝi lernis esperanton en sia sesdeka jaro kaj ĝis en sia alta aĝo ĉeestis la kunvenojn de la Grupo, plenumante diversajn taskojn kaj oficojn, ankaŭ ĉe KCE kaj CDELI, kaj tiel ŝi povis sperti, ke per esperanto larĝiĝis ŝia viv- kaj pens-



horizonto, kiel raportas nekrologo en *SES informas*.

En 1994 mortis en Neuchâtel la protestanta teologo kaj pastoro **Edouard Waldvogel** (1893-1994), multflanka kristana pac-aktivulo kaj frua esperantisto, kiu en la 20-aj jaroj prizorgis la paroh-ejon de Les Eplatures apud La Chaux-de-Fonds. Li estis esperanto-aktivulo dum diversaj periodoj, oficis ankaŭ kiel UEA-delegito, kiam li loĝis postmilito en Chez-le-Bart. Lia nevo **Jean Waldvogel** (\*1914), loĝanta en Gorgier, lernis esperanton en 1959 kaj partoprenis plurajn esperanto-aktivecojn en- kaj eksterlande.

Ankaŭ la anoj de la sekva esperantista kvaropo aŭ devenis el la neŭŝatela kanton aŭ estis ligitaj kun la esperanto-movado en tiu regiono: **Jean Perriard**, **Marcel Jaccard**, **Jules Gilliard** kaj **Charles Ecabert**.

Jean Perriard (1889-1975) komencis karieron kiel bankoficisto en Neuchâtel, poste laboris en Zuriko kaj Berno kiel revizoro ĉe la ĉefdirekcio de la svisaj fervojoj. La agado de tiu frua esperanto-pioniro pli ĉefe rilatis al KELI kaj SAEF.

La kemiisto Marcel Jaccard (1902-1973), doktoriĝis en Laŭzano kaj estis dungito de la Konfederacia Laboratorio por Materia Ekzamenado en

Dübendorf/ZH. Post sia emeritiĝo en 1966 li revenis kun sia edzino al la neŭŝatela kanton, kie ili ekloĝis en Montmollin. Marcel Jaccard, kiu estis ankaŭ membro de la filozofia J.E.A.N.-movado, dediĉis sian libertempon al esperanto dum ĉirkaŭ 55 jaroj. En 1927 li ricevis sian superan diplomon de SES, 1939-1942 li oficis kiel prezidanto de SES, kies ekzamenan komitaton li prezidis. Krom tio, Marcel Jaccard estis oficiala kunlaboranto de la *Svisa Antologio* (1939) kaj kunlaboris kun William Perrenoud, organizante ties prelegojn pri geonismo en Zuriko.

Tra la Civilservo Internacia aperis en la 30-aj jaroj en la esperanto-movado Jules Gilliard (1901-1962), mekanikisto kaj ĝardenisto, loĝanta en La Neuveville/BE. Jules Gilliard partoprenadis la kunvenojn de la neŭŝatela Esperanto-Grupo kaj de SES, forte interesigante pri lingvaj demandoj kaj posedante propran esperanto-bibliotekon. 1945-1947 li estis prezidanto de SES, sekve ĝia honora membro, redaktoro de *Svisa Esperanto-Revuo* kaj delegito de UEA. Post la dua mondmilito li organizis kun **Fritz Liechti** kaj Edouard Waldvogel la helpagadon favore al la malsataj germanoj.

## Trista funebra jaro

En la sama jaro 1962 oni devis priplori la forpason krom de Jules Gilliard - kaj de Edmond Privat - ankaŭ de Charles Ecabert (1913-1962), kiu estis, kiel Edouard Waldvogel, diplomita teologo (1938) kaj instruisto por la klasikaj kaj aliaj lingvoj en la antaŭgimnazio Latina Kolegio Numa Droz (de 1956) kaj en la Supera Komerca Lernejo de Neuchâtel. Ĉi tiu lingva talentulo, cetere kuzo de **Michel Frésard**, ellernis esperanton en 1959 en tre mal-longa tempo (kun supera diplomo). Esperanton li aprezis kiel simplan latinon, kaj estis kvazaŭ esperanto-stelo subite falinta de la ĉielo. En 1960 li organizis la trian manifestacion de Esperanto-Edukistaro de Svislando, kies prezidanto li fariĝis en 1961. En 1962 li transprenis la redaktadon de *Svisa Espero* kaj parton de la esperanto-elsendoj de Svisa Radio Internacia, laŭ rekomendo de Edmond Privat.

Charles Ecabert estis konvinkita, ke esperanto faciligas al la lernantoj ilian aliron al la klasika kulturo kaj arde deziris, ke esperanto iam ludu apartan rolon en la lernejoj programoj. Lia abrupta morto, kaŭzita de nedifinebla virusa malsano, ŝokis la aktivulojn kaj sendube estis granda perdo por la movado.

La ekspozicio pri Edmond Privat kaj Charles Ecabert en la Supera Komerca Lernejo de Neuchâtel en 1963 ne maltrafis la adekvatan intereson de la publiko.

## Aliaj personecoj

Kiel porstudenta pastoro laboras en Neuchâtel **Norbert Martin**, kiu iam kunlaboris kun KCE kiel ties komitatano. En Savagnier loĝas la poliglota esperantisto **Jean-Thierry von Büren** (\*1955), instruisto en Neuchâtel en la Supera Komerca Lernejo. Li estas konata pro sia politika, kultura kaj ĉefe muzika engaĝiĝo en diversaj komisionoj kaj medioj. Kvankam movade ne tiom aktiva, Jean-Thierry von Büren, kiu lernis esperanton en 1989 pere de KCE, partoprenas de tempo al tempo en diversaj kunvenoj.

Kiel juristino laboras en Neuchâtel **Sonja Bétrix Koleva** (\*1970), bulgara esperantistino, kiu eklernis esperanton en 1985, loĝas en Svislando ekde 1990 kaj kiu iam kunlaboris kun KCE/GEP.

El Neuchâtel devenas ankaŭ la instruistino **Hélène Raymond** (\*1916), kiu lernis esperanton en 1931 en Cernier kaj faris la superan diplomon de SES. Kvankam membrino de SES kaj UEA, ŝi neniam estis aktiva en iu societo, ĉar ŝi vivis malproksime de la grupoj. Despli ofte ŝi



korespondis kun eksterlandaj gesamideanoj kaj faris provon traduki la romanon *Hura* de Gyula/Julio Baghy al la franca, sed ne povis trovi eldoniston. Ekde 1945 ŝi estis delegitino de Internacia Esperanto-Ligo en Bellerive/VD, nun ŝi logas en Cerniaz/VD.

## SES jarkunvenoj

La jarkunveno de SES okazis kvarfoje en Neuchâtel: en 1916 en la urbodomo, en 1933 en la salono de la Granda Konsilio, en 1955 kaj en 1996 en la stacidoma restoracio. Precipe la kunveno en la jaro 1916 en la ĉeesto de 80 personoj kaj kun la partopreno de René de Saussure devis esti plena de ĝojo, energio kaj optimismo.

## Pri La Chaux-de-Fonds

En la urbo La Chaux-de-Fonds, la muzikinstruisto **Bernard Junod** en 1904 aranĝis malgrandan Esperanto-ekspozicion, kaj unu jaron poste Jean Wenger (1881-1960) prelegis en tiu urbo pri la nova lingvo, sub la aŭspicio de la Komercista Societo.

La loka Esperanto-Grupo mem estis fondita de **Jules Wolf** (1887-1944), ano de juda familio, kies patro verŝajne ricevis la unuan Esperanto-Libron, rekte de L. L. Zamenhof el Varsovio tra la sinagoga medio en La Chaux-de-

Fonds, kiel rakontis lia bofilino **Mathilde Wolf** al Claude Gacond. Jules Wolf gvidis la Esperanto-Grupon dum du jardekoj en diversaj funkcioj.

Ankaŭ en la horloĝa metropolo ne raris tiam esperantomanifestacioj kun kelkcentoj da personoj. Al la frua tempo de la loka Esperanto-Grupo apartenas ankaŭ la forgesitaj samideanoj **Carlo Picard** (1882-1926) kaj **Charles Rosen** (+1948 aŭ 1949).

La grupo estis reorganizita en 1916 de **Emma Crisinel**, kiu transprenis ĝian prezidon; ŝi trapasis la superan diplomon de SES en 1920. Samjare Jules Wolf kaj lia edzino Mathilde evidente sukcesis konvinki la edukinstancojn enkonduki nedevigajn Esperanto-kursojn en unuagradajn lernejojn. En 1935 la estraron de la loka Esperanto-Grupo konsistigis, apud Jules Wolf kiel honora prezidanto, **René Zollinger** (1912-1992) kiel prezidanto, **Chs. Eckert**, kasisto, **J. Crisinel**, sekretario kaj s-ino **Montandon**, helpantino. En 1969 la Esperanto-Grupo estis prezidata de **Max-Henri Béguin** (1918-2000).

## CDELI kaj KCE

Kun la starigo de CDELI kaj de KCE/GEP, la loka Esperanto-Grupo de La Chaux-de-Fonds, al

kiu apartenis ankaŭ Claude Gacond (\*1931) kiel sekretario, lia edzino **Andrée Gacond-Giroud** (\*1933) kaj ties fratino **Cosette Sandoz-Giroud** (iama nomo: **Cop**; 1937-2001), esperantistino de 1953 kaj iama UEA-delegitino, kiu 1969-92 estis politike aktiva en sia komunumo, same kiel ŝia edzo **Raoul Cop**, kunfandiĝis kun la novaj lokaj esperanto-institucioj, kiuj ek-establiĝis en la 60-aj (CDELI) respektive en la 70-80-aj jaroj (KCE/ GEP).

Ĉi tiuj institucioj kompreneble helpis, ke La Chaux-de-Fonds ricevis apartan signifon en la planlingva kaj esperanto-movado, iusence fariĝante unu el la ĉefurboj de la "Esperanto-lando".

Ĝis la fruaj 70-aj jaroj tre aktive ag-adis prezide al la loka grupo kaj ankaŭ kadre de CDELI **Hélène Berger**. Kiam ŝi estis dungita de la Urba Biblioteko, ŝi ludis gravan rolon por la rilatoj kun la esperantkaj german-lingvaj vizitantoj.

Krom Claude Gacond kaj René-William Perrenoud, inter la kunfondintoj de KCE (kaj de ties fako Internacia FERIA Altlernejo) troviĝis **August Braun** (1915-1985), unua prezidanto de KCE (ĝis 1984), poste ĝia vicprezidanto. Ĉi tiu agnoskita fizikisto en la Svisa Laboratorio pri Horloĝaj Esploroj en Neuchâtel disponigis sin ankaŭ kiel UEA-delegito en Hauterive.

## Interesaj personecoj

Inter aliaj neŭsatelaj simpatiantoj de la esperanto-movado kaj de la agado de Edmond Privat, la spirita patro de la esperanto-institucioj en La Chaux-de-Fonds, estas notindaj kelkaj interesaj personecoj, kiuj eble ne apartenis al la "tipaj" esperanto-movadanoj, sed kiuj, admirante la kreigon de la esperanto-institucioj en La Chaux-de-Fonds, per siaj profesiaj konoj diversmaniere alportis sian konkretan, moralan aŭ financon helpon.

Ekzemplas tiurilate **Maurice Favre** (\*1922), licenciulo pri juro (Universitatoj de Neuchâtel kaj Bazelo) kaj konata advokato-notario en La Chaux-de-Fonds, specialiĝinta pri abortoj kaj patrinaj rajtoj, imposta juro kaj asekuroj por malsanuloj. Kiel membro de la radikala partio Maurice Favre estis ano de la Urba Konsilio de La Chaux-de-Fonds (1948-1979) kaj deputito de la Neŭsatela Kantona Konsilio (1949-1979). Li prezidis la radikalan partion de la kantono Neuchâtel (1957-1970) kaj en 1962 estis membro de la direkta komitato de la radikala partio de Svislando. Lia kandidatiĝo por la svisa parlamento (Konsilio de Kantonoj) en 1985, kiam li publikigis sian "*scenarion 2035*", tamen ne havis sukceson. Maurice Favre, kies antaŭuloj estis konstruistoj de



muzikskatoloj, interesiĝas krome pri historio de la ĵurasa kulturo kaj pri la loka dialekto kaj iom publikigis prie. Kiam en la sesdekaj jaroj li publike pensis pri tunelo sub la pasejo Vue-des-Alpes, oni primokis lin kiel utopiulon. La sinteno de Maurice Favre al esperanto, kiun li siatempe eklernis ĉe **Olivier Tzaut** kaj okaze de esperanto-aranĝoj, klopodante diskonigi ĝin en siaj partiaj rondoj per manifesto, estis ĉiam tre favora. Tiel, en la esperanto-movado li disponigis sin ĉefe kiel advokato de Kooperativo de Literatura Foiro kaj, ĝis ĝia malfondo en 2001, servis senpage kiel membro-konsilanto al la fondaĵo Gastejo Edmond Privat (GEP), kies statuton li helpis ellabori.

### Ĉirkaŭ CDELI

Ĉar CDELI estas integra parto de la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds, menciindas la nomoj de **Fernand Donzé**, la tiama direktoro de la Urba Biblioteko, kiu disponigis al Claude Gacond siatempe ejon por la Esperantolibroj kaj **André Sandoz**, la prezidanto de la urbo, kiu prezidis la Fonduson Edmond Privat sine de la urba biblioteko; **Pierre Hirsch** (\*1913), kiu en 1964 povis ekokupiĝi pri tiu fonduso, vicprezidata de Claude Gacond kaj administrata de Fernand Donzé.

Kiel membroj de la fonduso kunvenis **Yvonne Privat**, la vidvino, **André Tissot**, la direktoro de la gimnazio, **John Nussbaum** kaj **Eric Descoedres** (1910-1987).

Kiel Pierre Hirsch, licenciulo pri klasika beletro, gimnazia instruisto en la Chaux-de-Fonds, kiu aŭtoris plurajn studojn pri Rousseau, Mallarmé, Rolland, Privat k.a., ankaŭ Eric Descoedres devenis de la Neŭŝatela Ĵuraso. Li laboris kiel bankoficisto, sindikatano, kooperativano kaj redaktoro. Kiel pacaktivulo, li rifuzis en 1933 la armean deĵoron kaj sekve estis arestita kaj senlabora. Ekde 1937 li laboris en Nederlando en internacia sindikato kiel tradukisto. En 1939 lia familio revenis al Svislando. Sekve, Eric Descoedres laboris en laŭzana kooperativo, poste en sindikato en Zuriko. Poste li transprenis la postenon de ĉefredaktoro de la revuo *Coopération*, la organo de COOP, kaj plenumis tiun oficon ĝis 1975. Paralele li ĉefredaktis la romandan gazeton *L'Essor* (1953-75). Dank' al Eric Descoedres aperis artikoloj pri esperanto en la de li redaktataj gazetoj. Kun ĝia antaŭa redaktoro Edmond Privat, Eric Descoedres estis amike kaj kunlabore ligita. La SES-anoj konatiĝis kun Eric Descoedres ankaŭ pere de tradukoj, kiuj aperis en *Svisa Espero* (ekz. 1/1946).

Gravaj kunlaborantoj de CDELI estis ankaŭ la bibliotekistino **Suzanne Boichat** en la 70-aj jaroj, kiu estis anstataŭita de **Pierre-Yves Tissot**, kiu poste fariĝis direktoro de la biblioteko de Le Locle. Ĉi tiu ne devas esti intermiksita kun **Edouard-Louis Tissot** (1897-1978), inĝeniero kaj fabrika direktoro en Le Locle, kiu aktivis kiel esperantisto en la 70-aj jaroj. Kiel faka kunlaborantino de CDELI nuntempe deĵoras **Martine Schneller** (\*1945).

Ĉe CDELI inter la reprezentantoj de aliaj planlingvoj, flanke de Interlingua/IALA estas memorinda precipe **André-Philippe Schild** (1910-1981), kiu naskiĝis en Neuchâtel kaj lernis junaĝe esperanton kun William Perrenoud, kaj flanke de Interlingue-Occidental **Alphonse Matejka** (1902-1999), kiu unue lernis Idon kaj longe laboris kaj vivis en La Chaux-de-Fonds.

### Aliaj aktivuloj

Lige kun la esperanto-movado en la Neŭŝatela Kantono estas aldonindaj la sekvantaj aktivuloj: **Mireille Grosjean**, **Marion** kaj

**Mario Bélisle-Grosjean**, **Marguerite Bosserdet** kaj **Edgar Jobin** (instruado) kaj **Marie-Louise Münger** (kristanoj). Ne-laste, la alternativa lernejo La Grande Ourse kaj ĝia direktorino **Véra Zaslavsky** en La Chaux-de-Fonds, oficialigis esperanto-instruadon al siaj gelernantoj. La esperanto-instruantoj estas **Anke Brouwer**, kiu ankaŭ instruas la germanan kaj **Monika Molnar** veninta el Hungario kaj ankaŭ kunlaboranta ĉe CDELI.

Kadre de KCE nuntempe laboras Giorgio Silber kaj Perla Martinelli.

Andy Künzli

-oOo-



# Tutsvisa aktiveco

## CDELI

Centro de Dokumentado kaj  
Esploro pri la Lingvo Internacia  
Biblioteko de la Urbo

Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds  
Tel.: 032 967 68 55.

Fakso: 032 967 68 29, indiki: por CDELI.

Retadreso: CDELI.VCH@ne.ch

martine.schneller@ne.ch

claud.gacond@ne.ch

nancy.fontannaz@ne.ch

### Transforma periodo

La Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds travivos periodon de pligrandiĝo, kiu interalie profitos al CDELI mem, kies laborsalono migros al pli prestiĝa ejo centre de la dua etaĝo, ekzakte super la freska salono, kie ofte okazis niaj prelegaj kunvenoj. Tiu ĉi freskejo fariĝos ekspoziciejo. Kaj en la vidalvida ŝtuparo instaligos lifto.

### Interrompo de la kunvenoj

Tiuj transformoj pertubos kaj eĉ plursemajne ĉesigos la aktivecon mem de CDELI. Tial la venonta studsabato okazos nur la 20-an de novembro. Ĉiu notu tiun ĉi daton en sia agendo por kunfesti la inaŭguron de la nova salono

kaj ĉeesti la lanĉon de nova serio da studaranĝoj. Ĝis tiam ni celos fortikigi la organizan kaj instruon teamon profite al ties didaktika efiko.

La du lastaj studsabatoj marta kaj maja grupigis ĉiufoje pli ol dekkvino da partoprenantoj, inter kiuj ĉiam renkontiĝis novaj komencantoj. Nur strangas, ke malofte partoprenantoj venas el Germanio, eble pro la manko de funkcia perkorespondanta kurso por germanlingvanoj.

Pri la franclingva kurso diligente zorgas Nancy Fontannaz, kaj kiam la lernantoj ĝin finas, tiam ŝi pretas plue korekti ekzercojn el aliaj lerniloj kaj el *Paŝo al plena posedo* de William Auld.

La partoprenantoj al la studsabatoj aŭ la vizitantoj de CDELI profitas la okazon por akiri librojn de la libro-servo de Esperanto perkoresponde kaj de la preze tre favora brokantejo de CDELI.

### Dankon al donacintoj

CDELI dankas al Lucienne Dovat en Renens, al la heredantoj de Eugen Bretscher en Winterthur kaj al Kurt Schweizer en Ettigen. Iliaj donacoj de libroj, dokumentoj kaj revuoj estas bonvenaj. Dank' al tiaj donacoj CDELI kompletigas siajn kolektojn. Ni memorigas, ke ĉe CDELI la libroj kaj broŝuroj konserviĝas je po tri

ekzempleroj, kaj la periodaĵoj je unu ekzemplero. La materialo, kiun CDELI jam posedas, neniel perdiĝas. Ĝi riĉigas brokantan servon, kies vendoj alportas monrimedojn al CDELI. Grandparte la koncernaj brokantaĵoj ankaŭ ebligas senpage helpi al la kreo aŭ riĉigo de esperanto-bibliotekoj, kiel ĵus okazis por la afrikaj landoj Madagaskaro kaj Senegalio kaj por la Grupo La Stelo en Genève.

### Vizito

Inter la vizitintoj de CDELI menciinda estas Duncan Charters, unu el la ILEI-gvidantoj, kiu venis dufoje el Usono ĉi-printempe por esploroj koncerne al la esperanto-instruado kaj al la pretigo de esperanto-ekzamenoj.

# KCE

Kultura Centro Esperantista  
Strato Postiers 27, Poŝtfako 311  
2301 La Chaux-de-Fonds.  
Tel. kaj fakso: 032 926 74 07.  
kce.esperanto@bluewin.ch

## Programo

Sen alia indiko la menciita aranĝo okazos ĉe KCE mem.

**Julie 05-10:** Naturamika semajno en Grindelwald kun Francisko Degoul.

**13-18:** Plurnivela internacia kursaro: unua semajno.

**20-25:** Plurnivela internacia kursaro: dua semajno.

**Aŭguste 02-06:** Naturamika kaj romanĉa semajno en Engadino (konfirmota).

**07-14:** Kultura esperanto-semajno. En la programo: muziko, teatro, prelegoj, studgrupoj, atelieroj, ekskursoj kaj simpozio pri la esenco kaj estonteco de Esperantio (en kongresejo kun teatro).

**14-21:** Seminario por la trejnado de kulturaj manaĝeroj kunlabore kun TEJO (parte ekster la domo Naville).

**Septembre 25-26:** Kultura semajnfino pri muziko, prelegos kaj kantos Georg Roessler kaj Jean-Thierry von Büren (konfirmota).

Sekvos aliaj kulturaj semajnfinoj en oktobro kaj novembro, kaj zamenhofologiaj tagoj en decembro 2004.

## Ĝenerala Asembleo de LF-Koop

La ĝenerala Asembleo de LF-koop okazis la 27-an de marto. Ĝi aprobis la represon de *Paŝoj al plena posedo* de William Auld, traktis la eblon represi la verkon de Zofia-Banet Fornalowa: *La familio Zamenhof*, la reeldonon de *Poemoj* de Pavese, aprobis eldonon de nova libro: Ernst Juenger: *Sur la marmorklifoj*, kun la traduko en esperanton de Bertil Nilsson.

Ĉe la Filmofako estas planata transformi por didaktika celo al DVD du filmojn: *Babel'* kaj *Esperes Despere*.

Ĉe la bendofako estas preparata operdisko danke al Jean-Thierry von Büren.

La Asembleo aprobis unuanime la ideon modifi la statuton, tiel ke la rajto aĉeti kooperativajn akciojn estu donita



ankaŭ al ĉiuj anoj de la Esperanta Civito, kaj ne nur al la stabanoj kaj kelkaj LF-abonantoj.

Ĉesis la mandato de prokuristo por Sonja Brun, kiu restas aktiva en la

societo. Estis elektita kiel librotenisto Anna Lászay.

-oOo-



# Loka vivo

## Basel

### Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel, Tel.: 0049 76 214 57 12

Kunvenoj: 20h00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

### Kunvenoj

**Junie 24:** Minigolfo en Grün 80. Rendimento antaŭ Grün 80 je la 10 h 00, poste babilado sur la teraso de la restoracio.

**Aŭguste 29:** Ekskurso longe de la rivero Wiese al Bettingen.

## Genève

### Esperanto-Grupo "La Stelo"

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20

Espéranto-infos: Tel.: 022 740 04 45

Monata kunveno ĝenerale ĉiun unuan mardon de la monato je la 20 h 00 en la restoracio «Aux Cheminots», Rue des Gares 7, Genève. Komuna vespermanĝo ekde la 19-a horo.

## Venontaj kunvenoj

**Junie 1.**

**Julie 17** sur la Insulo J.-J. Rousseau:

**Aŭguste 14:** Sur la Insulo Rousseau:

**Septembre 7.**

**Oktobre 5**

**Novembre 2.**

**Decembre 7.**

**2005 Marte 1:** Ĝenerala jarkunveno.

## Raportoj

### Ĝenerala Kunveno

Sub la tagprezido de Anita Altherr kaj en ĉeesto de 14 stelanoj okazis ĝenerala kunveno de La Stelo la 2-an de marto en la hejmo de Camille kaj Andres Bickel. Inter la gravaj eventoj emfazitaj estis menciitaj prelego de Bruno Graf, ŝipvojaĝo, vendo de T-ĉemizoj, anoncoj en *Le Courier*, manifestacio ĉe Palaco de Nacioj, kursoj de Claude Piron kaj Claude Gacond, kreskigo de la esperanto-fako de la Interkultura Biblioteko de la

Ruĝa Kruco, Rue de Carouge, kreo de retejo, vendo de ĉirkaŭ 100 libroj en Librairie Harmonie kaj respondo al po du aŭ tri telefonaj informpetoj semajne.

La raporto de la kaskontrolanto estis unuvoĉe aprobita kaj la kunveno dankis al Gilda Pace por la bona librotenado. Ŝi konsentis daŭrigi sian funkcion kaj Patrick Perréard kaj Lucien Dahan daŭrigas sian funkcion de kaskontrolantoj.

Decidiĝis munti standon en "Village alternatif" de la Ĝeneva Libro-Foiro sub la respondeco de Marie Zoller.

Charmian Common proponis, ke La Stelo havu ret-kontaktejon pretigotan en kunlaboro kun Stefano Keller.

Anita Altherr prelegis pri la centjarigo de SES per monstro de fotoj.

## Ĉe la Ĝeneva Libro-Foiro

Inter la 28-a de aprilo kaj la 2-a de majo okazis la Ĝeneva Libro-Foiro 2004. Ni havis budon en tre bona loko de la Alterna Vilaĝo. Per afiŝoj koloraj ni preparis allogan ekspozicion kun multaj infomoj disdoneblaj.

Dum la 5 ekspozici-tagoj deĵoris ĉirkaŭ 20 esperantanoj francaj kaj svisaj, kaj aliaj samideanoj venis por saluti ilin. Estis bona okazo por pli bone konatiĝi.

La rezulto de la manifestacio estas pli bona, ol ni antaŭpensis. Ĉirkaŭ tricento da personoj vizitis nia budon. La plej multaj estis interesitaj kaj reagis tute pozitive. Ili volis scii pri la lingvo, kiom da homoj parolas ĝin tra la mondo, ĉu ekzistas literaturo, al kio utilas esperanto, ktp. Ni estis finfine

surprizitaj pri la nombro de tiuj vizitantoj, kiuj informiĝis, kie oni povas lerni esperanton. Ni disdonis multajn inform-foliojn pri kursoj lernejoj, poŝtaj aŭ retaj kaj pri esperanto-grupoj en Francio kaj Svislando.

Se tio eblos, ni refaros tion venontjare. Ni certe plibonigos la agadon dank' al la ĉijaraj spertoj!

Marie Zoller

## Kvartala Festo en Servette

Sabate la 15-an de majo ni partoprenis kvartalan feston en Servette. Ni sidis sub blanka tendego kun aliaj aktivuloj pri lingvoj kaj skribarto. Ni havis grandan tablon kaj Charmian Common preparis ludon kun kartetoj por konstrui facilajn frazojn kaj ties tradukojn.

Pli da homoj (infanoj kaj plenkreskuloj), ol ni antaŭvidis, vizitis nian standon.

Ni verŝajne refaros unu aŭ du aliajn tiajn prezentojn antaŭ la fino de la lerneja jaro.

Ni feliĉas, ĉar gravas, ke oni parolu pri esperanto en publikaj lokoj kaj rememorigu al la publiko, ke esperanto bone vivas kaj estas lernebla.

Marie Zoller.



# Lausanne

## Laŭzana Esperanto-Societo

Case postale 389, 1009 PULLY

Tel: 021 729 58 02

<esperanto@isuisse.com>

<http://www.esperanto.ch>

Kunvenoj: Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20h00.

## Kunvenoj

**Junie 13:** Ekskurso al Zoo de Servion.

**Julie 6 kaj 8:** Prezento de esperanto en "Passeport Vacances".

**Aŭguste 2 kaj 4:** Prezento de esperanto en "Passeport Vacances".

**Septembre 6:** Kunveno.

**Oktobre 4:** Kunveno.

**Novembre 1:** Kunveno.

**Decembre 12:** Zamenhofa festo.

## Raporto

La lundon 5-an de aprilo Claude Gacond prezentis diversajn manierojn prezenti esperanton al ĝenerala publiko, al instruistoj kaj al poliglotoj.

# Luzern

## Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke

Tel.: 041 280 46 12.

Kunvenoj:

Hotelo Steghof, Voltastrasse 2, atingebla de la stacidomo per la trolebusoj 4 kaj 5.

Restoracio Simplon, Habsburgerstrasse 14.

## Kunvenoj

**Junie 2:** Steghof: 14 h 00 kun Franz Brügger: Paroliga leciono; 14 h 30 kun

Sonja Brun: Henri Dunant, samtempulo de L. L. Zamenhof.

**Julie 7:** Simplon: 14 h 00-16 h 00: Konversacio kun Franz Brügger.

**Aŭguste 7:** Ekskurso duontaga.

**Septembre 1:** Simplon: 14 h 00-16 h 00: Konversacio kun Franz Brügger.

**Oktobre 6:** Steghof: 14 h 00 kun Franz Brügger: Paroliga leciono; 14 h 30 kun Dieter Rooke: Pri la Universala Kongreso en Pekino.

**Novembre 3:** Simplon: 14 h 00-16 h 00: Konversacio kun Franz Brügger.

**Decembre 1:** Steghof: 14 h 00 kun Franz Brügger: Paroliga leciono; 14 h 30 kun Paul Scherer: Zamenhofologio kaj programo 2005.

**2005 januare 5:** Simplon: 14 h 00-16 h 00: Konversacio kun Franz Brügger.

# Kantono de Neuchâtel

## La Chaux-de-Fonds

### Interrompo de la Studaj rondoj ĉe CDELI

Niaj kunvenoj interrompiĝos, ĝis kiam la nova CDELI-salono estos alirebla.

## Gratulon al La Grande Ourse Fabelkonkurso 2003.

En oktobro 2003 Finnlanda instanco organizis fabelkonkurson kun esperanto-sekcio por infanaj rakontoj.

Inter la kandidatoj troviĝis gelernantoj de La Grande Ourse. Kaj ni havas la fieron anonci, ke koncerne al iliaj kontribuoj tri sendoj ricevis premion:

En la kategorio de la 11-13-jaruloj, la lernantino Laura Ziegelmüller ricevis la trian premion por sia rakonto "Ĵinja". Kaj en la kategorio Grupo, Ecole de la Grande Ourse ricevis la unuan premion por "Amo sen limo" kaj la lernantoj Ivan Gandolfo kaj Martin Haldimann la trian por "Marcel".

Gratulon al tiuj gelernantoj de La Grande Ourse kaj al ilia esperanto-instruistino Monika Molnar.

## Ekspozicio en Le Locle

En la enira koridoro de la duagrada lernejo en Le Locle la jubilea ekspozicio pri esperanto estis prezentita dum la monatoj aprilo kaj majo. Aldoniĝis montrofenestro, kiu konigis al la gelernantoj kaj al la kolegoj, ke Mireille Grosjean, instruistino de la germana, vizitadis multajn landojn kaj kongresojn dank' al esperanto.

Kelkaj interesataj lernantoj eklernas esperanton kun Mireille Grosjean kaj ankaŭ perkoresponde.

# Wil

## Esperanto-Klubo Wil

Prezidanto: Stanislaw POCHANKE

Lettenstrasse 70, 9500 Wil. Tel.: 071 911 68 30.

Vicprezidanto: Verena CHAVES-WALDER.

Rosenhügelstrasse 22, 9230 Flawil.

Tel: 071 393 41 49.

Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato je la 19h00 en la Restoracio Blumeneck, Säntisstrasse 1 (malantaŭ la stacidomo).

## Venontaj kunvenoj

**Junie 2:** Escepte je la 16 h 00: Eta solena-aĵo: **40 jarojn de Esperanto en Wil.**

**Julie 7:** Minigolfa ludo kun Stanislaw Pochanke. Renkontiĝo ĉe la minigolfejo de la Klinikio Wil.

**Aŭguste 8:** (Dimanĉe): Kun Verena Chaves-Walder tuttaga ekskurso de Rorschach al Heiden – Walzenhausen – Rheineck kaj reen al Rorschach. Por ricevi detalajn informojn telefonu al 071 393 41 49.

**Septembre 1:** Temo elektota.

**Oktobre 6:** Pri la 89-a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino raportos Roberto Bogenschneider.

**Novembre 3:** Pri la 56 IFEF-Kongreso en Sopron (Hungario) raportos Ernst Glättli.

**Decembre 1:** Zamenhofa vespero.

# Zürich

## Esperanto-Societo Zürich

Akazienstr. 6 / PF 858, 8034 Zürich-Seeefeld

Tel.: 044 251 50 25 <info@esperanto.ch>

reto: www.esperanto.ch/zuriko

## Programo

Ni renkontiĝas la 2-an dimanĉon en la monato posttagmeze por libera kafumado de la 14-a ĝis la 17-a horo. La venontaj datoj estos: 13-an de junio, 11-an de julio, 8-an de aŭgusto, 12-an de septembro.

Ĉiujn merkredojn vespere de la 19-a ĝis la 20-a horo (krom dum la lernejoj ferioj) okazos konversacia kurso por komencantoj kaj personoj kun bazaj konoj. Kotizo: Fr. 12.- por vespero. Oni povas partopreni daŭre aŭ nur



unuopajn vesperojn. Necesas ĉiam telefoni aŭ persone anticipi aliĝi (sub telefono 044 251 50 25 ĉe Nelida Weidmann).

## Raporto

La informo, ke Zikosek ne venos, ne plu povis atingi ĉiujn, kaj alvenis tuta grupeto da homoj (4 personoj, kun mia edzino kaj mi ni do estis 6 personoj). Malgraŭ la neĉeesto de la preleganto, tiu grupo pasis agrablan vesperon kun teumado kaj libera babilado – do la tuta afero tamen havis pozitivan efikon.

Dietrich Weidmann.

-oOo-

## Radio

Mireille Grosjean sciigis, ke la romanda radio-stacio "Radio suisse romande", unua programo, raportis la mardon 28-an de januaro dum la ĉefa elsendo pri novaĵoj je la 12 h 40 pri Porto Alegre menciante la ekziston de stando promocianta esperanton.

Dieter Rooke aŭskultas perrete radio-elsendojn. Ni citas lin:

"En radio-arĥivo troviĝas ekde ne-longe ankaŭ Radio Havano. Sendinte mian retmesaĝon, la raportistino legis mian leteron jam la postan tagon, vere mirinda tekniko!

Al niaj SES-anoj mi proponas servon de sonbendoj kun la registritaj radio-elsendoj. Ekzemple Pola Radio, Radio Pekino, Vatikano, Radio Verda, Radio Havano, kaj aliaj.

## Televido

Mireille Grosjean aŭdis pri esperanto en filmo, jen la precizaj donitaĵoj:

Episode: "Le stagiaire": Dissendo je Télévision Suisse romande, vespera programo de vendredo 27-a de februaro. Pri la enhavo: Joséphine serĉas laboron. Ŝi prezentigas kaj mencias la lingvojn, kiujn ŝi parolas. Ŝi mencias malnovajn lingvojn, la keltan interalie, kaj esperanton kaj Volapük. Estis tuta listo da lingvoj!

-oOo-

Korespondpeto de

Navin Lal Shrestha, GPO BOX

11753, Kathmandu, Nepal.

Retadreso: skribu\_navin@yahoo.com

*Estimata samideano de Svislando.*

*Saluton!*

*Mi estas Navin de Kathmandu, Nepalo. Mi volas amikumi kaj esperantumi...*

*Miaj hobiaj: instruado, bildkartoj, komputilo, legado, vojaĝado, bildoj...*

*Kiu respondos?*

# Mortoj

## Marcel Moreillon (1906-2004)

Marcel Moreillon mortis la 20-an de januaro 97-jara. Kiam li ankoraŭ povis marŝi, tiam li tre aktive partoprenis la societan vivon de La Stelo kaj volonte gastigis samideanojn.

## Gisèle Weil

Gisèle Weil forpasis la 9-an de marto 91-jara. Ŝi aktivis en la movado J.E.A.N. kaj en La Stelo, gastigante la grupon en sia hejmo.

## Charlotte Ecklin (1916-2003)

Charlotte Ecklin (09.08.1926 - 19.09.2003) mortis post longa malsano en la maljunulejo Dreilinden en Lucerno. Ŝi estis longjara ŝatata membro de Lucerna Esperanto-Societo, sed jam delonge ne povis plu aktivi pro malsano. Al SES ŝi heredigis sumon de Fr. 4'000.

La funebran ceremonion pluraj membroj de LES ĉeestis kaj per kelkaj memorvortoj kaj preĝo substrekis la esperantan flankon de ŝia vivo.

## Erna Eugster (1925-2004)

Erna Eugster en Thal mortis la 5-an de marto. Ŝi naskiĝis en 1925 kaj estis longjara esperantistino, kiu flue parolis kaj kutimis partopreni la internaciajn renkontiĝojn en Sun-Hejmo.

## Adolf Burkhardt (10.04.1929-02.04.2004)

Kun grandega tristo ni adiaŭas al Adolf Burkhardt, aktiva kunlaboranto de KELI, KCE kaj de CDELI. Ankoraŭ pasintjare li vizitadis dum pluraj tagoj CDELI-n kun sia edzino Grete por kolekti revuojn favore al la riĉigo de la kolektoj de la esperanto-biblioteko en Aalen. Mi tiam ne imagis, ke lastfoje mi renkontas mian kolegon kaj amikon Adolf.

Jen sekvas nekrologa artikolo, kiun bonvolis redakti Richard Schneller.

Claude Gacond

Bedaŭrinde pastoro Adolf Burkhardt ne povis ĝisvivi sian 75-an naskiĝtagon je la 10-a de aprilo, li forpasis jam la 2-an de la sama monato post grava malsano. Tamen li ankoraŭ ĉeestis la aperon de la festlibro dediĉita al li dum transdona ceremonio kun laŭdo fare de Reinhard Hauptenthal la 17-an de januaro en Weilheim an der Teck proksime de Stuttgart.

Adolf Burkhardt aktivis dum jardekoj en la kristana esperantomovado kiel prezidanto de KELI, kiel arda pledanto por ekumena kunlaboro kaj kiel ĉefaŭtoro de la diserva libro «*Adoru*». Lia vivoverko estis la Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen, kies direktoro li estis.

Enkonduke al la menciita festlibro\* oni trovas kontribuon de lia filino Regina Lorösch: «*Biografia skizo pri Adolf Burkhardt*». Adolf Friedrich Burkhardt naskiĝis en Asperg (Vurtembergo, DE) kiel unua infano



de la poŝtovicisto Friedrich Burkhardt kaj ties edzino Luisa, naskita Seitz. Lian infanecon stampis la traŭmatizaj eventoj de la dua mondmilito, dum kiu lia patro pereis. Bonŝance la konfirmacia pastoro malkovris liajn intelektajn talentojn kaj ebligis al li frekventi gimnazion. Sekvis universitataj studoj en Elmhurst (Usono), Bonn kaj Tübingen. Paralele al siaj teologiaj studoj li preparis ekzamenon por interpretistoj kaj tradukistoj de la angla kaj trapasis ĝin kun distingo. Ekde 1977 li regule kunlaboris ĉe teologiaj konferencoj ĉie tra la mondo kiel simultana interpretisto (ĉefe anglegermane).

Esperanton li lernis jam en la gimnaziaj jaroj, dum kiuj li ankaŭ havis la unuajn kontaktojn kun KELI. Lia dua granda hobbio estis muziko kaj dum kantosemajno li konatiĝis kun sia estonta edzino Grete Schmid.

Post la unuaj profesiaj spertoj kiel vikario kaj anstataŭanto li ricevis konstantan paroĥon unue en Gechingen, post 12 jaroj alian en Bissingen, kie li restis 19 jarojn. Apud la multfacetaj postuloj de paroĥa ofico li fondis esperantogrupon, instruis la lingvon, organizis seminariojn kaj prelegojn pri esperanto. Adolf Burkhardt ankaŭ okupiĝis pri esperantigo de diversaj aktualaj kaj klasikaj tekstoj, kiel pruvas la ampleksa bibliografio en la festlibro. Lia senlaca aktivado en Germana Esperanto-Asocio kaj UEA estis rekonita per honora membrado en ambaŭ asocioj.

En 1961 li elektiĝis kiel prezidanto de KELI kaj oficis en tiu funkcio (por-

tempe kiel vicprezidanto) ĝis la jaro 2000. Li partoprenis preskaŭ ĉiujn KELI-kongresojn kaj iniciatis kun Stefan Maul kaj Jacques Tuinder en 1968 la unuan ekumenan kongreson. Laste li partoprenis tiun de Rimini en la jaro 2003.

En kongresoj de UEA li ofte kunlaboris kiel predikisto aŭ liturgiulo dum la diservoj.

Jam en 1968 li komencis rekonstrui en kunlaboro kun Reinhard Haupenthal la Bibliotekon de Germana Esperanto-Instituto minacata de pereco. El tio rezultis la nuna Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen, unu el la kvin plej grandaj esperanto-bibliotekoj.

Adolf Burkhardt ellaboris la unuan oficialan kantarono de KELI *«Adoru kantante»* (1971). Sekvis la kantokajero *«Tero kaj ĉielo kantu»* (1995-1998) kaj kiel kronono de sia ampleksa vivoverko Adolf Burkhardt transdonis en 2001 al la publiko la ekumenan diservan (kant-) libron *«Adoru»*, al kiu kunlaboris la du katolikaj pastroj Bernhard Eichkorn kaj Albrecht Kronenberger.

En 1992 la tiama federacia prezidanto Richard von Weizsäcker dekoris lin per la federacia merito-kruco pro lia senlaca, plurjardeka laboro por esperanto, interpopola kompreniĝo kaj la ekumenismo.


Richard Schneller

\*: *«Esperante kaj ekumene»*, festlibro por la 75-a naskiĝtago de Adolf Burkhardt, editoris Irmis kaj Reinhard Haupenthal, Eldonejo Iltis, Schliengen 2004, 368 paĝoj kun bibliografio.

(Recenzo aperos en venonta numero de *SES informas*.)

Tiu ĉi libro aĉetebblas ĉe la libroservo de Esperanto perkoresponde en CDELI.

-oOo-



# Kongresen

## Eŭropo sen mitoj

**Travivaĵoj dum la 20-a Jubilea Internacia Festivalo en la urbo Kiel.**

Jam la sepan fojon mi partoprenis la tradician aranĝon por la "rondo familia" kaj por infanoj. Ĉijare ĝi okazis en la germana urbo Kiel. Krom mi kaj mia filo, ankaŭ venis Nelly Krasniqi el la kantono Zug. La kadra temo de tiu 20-a IF estis Rusio. Fake venis arego de 11 rusoj kaj rusianoj por kontribui laŭvice al la arta programo, inter kiuj la kanzonisto Miĥaelo Bronŝtejn.

Prelegis pri la festivala temo Krystin Tyrgat el Belgio, kiu mem havas kaj privatan kaj profesionan sperton pri Rusio. Ŝi rakontis pri la interkulturaj rilatoj Rusio-Okcidento. Ŝi raportis pri siaj spertoj renkontante rusojn. Ŝajne ili ne konas agendon aŭ ne uzas ĝin kutime. Sed ili sin reciproke vizitas sen averte kaj spontanee. Pri la temo "Kiel okcidentano en breŝnjeva sovetunio" prelegis per lumbildoj Christoph Knabe

el Germanio. En tiu epoko tiam en Okcidenta Germanio regis la Brandt'a Respubliko. Nur malmultaj studentoj el kapitalistaj ŝtatoj kaptis la ŝancon studi en Leningrado.

La 30-an de decembro ni ekskursis al la urbo Lübeck sub la gvido de akademiano Werner Bormann. Antaŭ la urba preĝejo masonita el brikoj staradas statuo de diablo: granda atrakciaĵo por turistoj, ĝi estas senĉese fotata. Se ne ekzistus diablo, oni ja vane konstruus dian domon! Poste ni marŝis al restoracio kun marcipana butiko. Ĝin antaŭ jarcentoj fondis alemana familio Niederegger. La migdaloj estas importataj el landoj arabaj. Do vera muzeo kaj pri marcipano kaj pri internacieco. Prave ni nomas nian mondon granda vilaĝo!

Aĥman Junusev el Dagestano interesege rakontis pri sia regiono de montoj. Li mem emfazis, ke li apartenas al la gento "Lati", kvankam sur lia vizaĝo nur videblas la gento



homa! Dagestano ankaŭ estas kromnomata lando de paradizo. Norde de Dagestano troviĝas la lando de infero Ĉeĉenio, kiun jam enpenetris kelkaj teroristoj.

S-ino Elisabeth Schwarzer el Germanio provis enkonduki nin al edukado de demokratio. Ŝi proponis seminariojn laŭ aparta metodo sen striktaj instrukcioj. Tamen ŝi plene sukcesis. Ni forlasis la salondon kiel veraj diplomatoj sed sen akiritaj diplomoj! Dume el apuda salono aŭdeblis la entuziasma voĉo de la nelacigebla pastro Kronenberger, kiu instruis katolik-religiajn kantojn ja necesaj por diservo. Donis amuzan lecionon de muziko la operkantistino Elena Puĥova. Ŝi ekzercigis ĥoron internacian, kiu prezentiĝis plurvoĉe dum la adiaŭa vespero.

La lastan tagon kolektiĝis niaj rusiaj samideanoj ĉirkaŭ ronda rektangula tablo. Ili respondis amason da demandoj, de la rusa animo ĝis la nuntempa putina reĝimo.

Mi demandis pri la nuntempa farto de esperantistoj en prizono arestitaj post la SAT-kongreso en Moskvo. Ili estas akuzataj pro krimo kontraŭ la ŝtato kaj posedo de armiloj. Kiel mi aŭdis, ili eĉ kuraĝis pentri portreton de V. I. Lenin kaj L. L. Zamenhof sur unu afiŝo. Ŝajne tio ĉi estas eĉ pli granda krimo. Rusiaj esperantistoj ankoraŭ revadas pri onta Universala Kongreso en Rusio. Ĉu eble la nepoj nin benos?

La novjariĝon ni IF-anoj tostis plurfoje dum la silvestra balo. Ŝprucis ĉampanjo unue por la rusoj venintaj el

oriento, kaj kelkajn horojn pli poste venis la tempo por ni okcidentanoj.

Ĉiuvespere okazis distra programo de niaj rusiaj samideanoj. Miĥael Bronŝtejn spicis la programerojn per humuraj anekdotoj. Ili malkovrigis al mi la apartan kulturon de Rusio.

Mia propra kontribuo je mia kontento ne realiĝis. Ĉar mi estis en embaraso ne trovinte la taŭgan materialon por prelegi pri la rusia granda revolucio. Fontmaterialo ekzistas nek en la libroservo de UEA, nek en SAT. La sola, kiun mi trovis, estas bildrakonto trivoluma de la eldonejo Progreso en Moskvo, kaj la broŝuro de Eŭgeno Lanti "*Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetunio?*"

Mia filo Ciril pasigis sian tempon petolante gaje kun aliaj infanoj. Precipe li ŝatis, ke venis knabo Gretar el Islando, kun kiu li amikiĝis jam dum la Universala Kongreso en Fortaleza kaj dum la SAT-kongreso en La Chaux-de-Fonds. Por infanoj estis organizita tablotenisa turniro, ili ankaŭ kune iris al naĝejo en apuda halo. Dum silvestro la pli aĝaj knaboj lanĉis la pireteknikaĵojn kaj la tutan nokton ili maldormis.

Mi esperas, ke ĉijare ni denove ĝuos la esperantan etoson dum la IF, kiu okazos en Magdeburg.

Dieter Rooke

## Vortaro francprovenca- franca, franca-francprovenca. Dominique Stich

Fine de la jaro 2003 aperis unuafoje vortaro pri la francprovenca lingvo.

La francprovenca estas/estis parolata en ĉiuj romandaj kantonoj krom la ĵuraso, en regionoj de Francio najbaraj al Romandio elde suda Franĉkonteo ĝis Savojo, en Forezo kaj Daŭfenlando en Aosta valo, kaj en kelkaj nordokcidentaj valoj de Piemonto. En 1873 tiu lingvo ekzistanta nur laŭ dialektaj formoj estis rekonita, kiel aparta, fare de la itala lingvisto I. Graziado Ascoli. Tiu lingvisto ne lerte baptis sian malkovron franc-provenca (la streketo nun ne plu uzatas), tiu nomo erare konfuzigas. La francprovenca areo, geografie situanta inter la lingvo d'Oï kaj la Okcitanaj, entenas tute aŭtonomajn karakterojn kiel ekzemple la latinan konjugacion en *-are*, kiu donis unu konjugacion en la franca kaj en la okcitanaj lingvoj, donis du konjugaciojn en la francprovenca, laŭ la konsonanto, kiu venas antaŭ la finaĵo. Ĝenerale tiuj latinaj verboj en *-are* donis: *-â(r)*, kiel *-cantare-* (kanti) donis *-chantâr-* (prononcata *tsantâ* en la vaŭda dialekto). Kiam tiu konsonanto estas palatigita kiel *-cuminittiare-* (komenci), ĝi donis *-iêr* (prononcata *-î-en* la vaŭda dialekto ekzemple).

Antaŭ kelkaj jaroj la franc-svisa lingvisto, Dominique Stich, el la familio de nia federala konsilanto Otto Stich, volis fari studon pri la francprovencaj toponimoj kaj penis trovi inoformojn pri tiu lingvo, ĉar ne ekzistis tiaj informoj por la tuta lingvo, ĉar ĉiu dialekto-parolantoj laboris en sia anguleto. Li decidis do mem krei grafion kaj ian gramatikon por la tuta lingvo. Lia celo ne estis vere proponi al la homoj, kiuj jam uzas francprovenca dialekton, unuecigan lingvon, sed proponi informojn al la ne francprovencaj. De tiu studo, kiu fariĝis

doktora tezo aperis unua libro: «*Parlons francoprovençal*» ĉe la eldonejo L'Harmattan. Estas interese noti, ke Dominique Stich verkis alian franclingvan libron je la sama eldonejo pri la alemana lingvo, inspirita de studoj de D-ro Arthur Baur. Li ankaŭ nun verkas etan vortaron romanĉ-francan.

Interesitaj per lia propono de komuna grafio por la lingvo francprovenca, kelkaj homoj, inter ili Alain Favre (SES-membro), decidis aperi vortaron laŭ la vortstoko jam kolektita de Dominique Stich. Tiu vortaro proponas dudirekan leksikaron kun mencio de la origina dialekto, neologismojn, kaj antologion kun tekstoj el ĉiuj dialektoj dugrafie (la loka kaj tiu de Dominique Stich). Notindas, ke tiu vortaro, almenaŭ en la komenco, havis pli da sukceso ekster la francprovenca medio, ol inter la dialektoparolantoj. Tiuj lastaj kompreneble timis la «trudon» de scienculo, ne komprenante la avantaĝon de tiu lingvistika kontribuo. Sed pli kaj pli la homoj alktimigis kaj ĉesas vidi «dangheron» en tiu kolopodo.

Nicole Margot.

Reklamo:

**Legu la plej interesan  
Esperanto-gazeton  
"Internaciisto"  
neneŭtrala, skribita de  
progresemaĵ aŭtoroj tra la  
mondo.**

Petu provnumeron de:

Luis Serrano Perez,

str. Font nova 32

ES-8202 Sabadell (Hispanio)